

La letero de l' Akademio de Esperanto

N° 9 — Oktobro - Novembro - Decembro 1989

ISSN 0986-1181



La "Amikoj de l' Akademio" kunvenis la 19-an de Novembro por sia Asembleo, la jara ĉefkunveno, kiu en 1989 koincidis kun la datoj de la 6-a INTERNACIA ESPERANTO-FESTIVALO kaj por kunigi la agrablan kun la necesa kaj por manifesti sian opinion, ke kulturo estas unu el niaj grandaj fortoj: se nia movado sukcesos disradii en la mondo, tion ĝi atingos, se ne nur, precipe per sia kulturo.

Aliparte, ĉar ni zorgas aserti, ke ni estas je la dispono de ĉiuj geesperantistoj, ni ĉi-jare kunvenis en la sidejo de S.A.T. tiel same, kiel lastjare ni profitis de la domo de U.F.E., Franca filio de U.E.A. Tiel ĉiujare ni intencas alternigi aŭ ŝanĝi la lokon.

Nun ĉe la sojlo de la tria jaro ni atendas, ke ĉiuj membroj "Amikoj" kaj abonantoj de "La Letero" sentos sin emaj manifesti sian ligitecon per renovigo de la kotizoj. Kaj tial ni povos nun plani por la nova jaro: projektion ni skizis dum la kunsido. Tiel "La Letero" povus aperi kun pli da paĝoj, se plimultiĝus la abonoj kaj kotizoj, ĉar la kosto rezultas ne nur el presado, sed ankaŭ kaj precipe el poŝta pezo. Eĉ povus planiĝi ankaŭ eldono de plia broŝuro de la Akademio, kiel ekzemple "Aktoj III".

Jam kvin Akademianoj alkiutimiĝis partopreni en "La Letero"; ni povas mem konstati eĉ la partoprenon de du pliaj Akademianoj en ĉi tiu numero de "La Letero". Sed ni bezonas pli oftajn kontribuojn de pli da Akademianoj.

Aliflanke ni bezonas pli da laborfortoj: la "Amikoj de la Pariza regiono" povus formi neformalan rondon pretan renkontiĝi en fiksdaj agapoj aŭ interamikaj manĝoj kaj helpi en diversaj taskoj pri voĉdona nombrado aŭ dissendado de "La Letero".

Ni elvokis ankaŭ pli aŭdacajn planojn, kiel tiun de prelegserio, ia simpozio aŭ konferenco de Akademianoj, kiu en sia tuto povus priskribi la nunajn konturojn de nia lingvo kaj ties kulturaj valoroj. Tio kompreneble estus farita en konsento kun la aliaj asocioj kaj serve al ili! Cetere kun partopreno de ankaŭ aliaj eminentuloj de ĉiaj horizontoj...


Sed ĉio ĉi dependas de via partopreno, viaj kotizoj, la helpo de mecenato...

D-ro André ALBAULT

N.d.l.R.:

"LA AMIKOJ DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO"-jara kotizo 100F.F.

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO"-jara abono 120 F.F.



NOTOJ PRI KAJ ĈIRKAŬ FAR

Vere surpriza pro sia galeco estis la artikolo de s-ro Felix Woolf pri far (= fare de) en Bona Espero (volumo 1989/27, numero 2).

Multajn vortojn emocie malmodernajn li elverŝis, ekzemple "ĥaosprovokan abomenaĵon malbelsonan", per kio li nenion pruvas, krom ke la vorteto ege malplaĉas al li - kaj miskomprenon pri la rolo de la Akademio. Kiel ofte en tiaj kazoj li eĉ faras rektan eraron, asertante ke far ne trovblas en la Plena Ilustrita Vortaro.

Kompreneble, tamen, ĝi ja enestas; ĉar almenaŭ du fojojn Waringhien ĝin mencias aŭ klare aludas, sub kaj de kaj fari. Mi citu:

De B) 11 RIM. 3 " Post verba subst. konfuzo povas okazi inter la sencoj 6a, 10a kaj 11a de la prep. de: la nutradon la infanoj ilia patrino estas la plej sana. Por tion eviti, oni disponas du rimedojn: 1) kiam oni devas samtempe esprimi la subjekton kaj la objekton de la subst-ago, oni povas anstataŭigi de 10 per fare de (aŭ far)..."

Faro ve de "Kunmetita prep., enkondukanta la aganton ĉe pasivo... RIM 2 Anst. ve de, la aparta konstruo de E-o ebligas uzi la nudan radikon kiel prep-on (analoge al per kaj peri): traduko de Homero ~ Manders." En ĉi-lastata ekzemplo sen ajna dubo temas pri far (la "nuda radiko" aludita)

Antaŭ ne tre longe la Akademio de Esperanto pritraktis proponon oficialigi la uzon de far. La plejmulto voĉdonis por tion ĉi ne fari. Aliflanke nia supera lingvoorganò sin skrupule detenis de kondamno, kio estas tre signifa. Do vane s-ro Woolf atakas "la nerajtigitan uzadon" de far kaj diras: " estas kaŭzo por bedaŭro ke, kvankam la ĉisupra uzo ne estis sankciita de la Akademio, membroj de ĉi eminenta homgrupo senpermeso kaj nerajtigite uzas ĝin..."

Tiaj eldiroj demonstras pensmanieron ne sufiĉe nuancitan krom profunda miskompreno pri la funkcio de la Akademio.

Inter ne oficialigi kaj nerajtigi ekzistas granda diferenco. Fakte restas al ĉiuj esperantistoj, eĉ Akademianoj, la rajto malgraŭe uzi la formon far. Same misa en la artikolo de s-ro Woolf estas la vorto senpermeso. Internacilingve oni ne bezonas, de iu ajn, permeson por la uzado de formo neoficiala, kiun la Akademio - post funda esploro - cetere ne kondamnis. Troviĝas en Esperanto miloj da vortoj neoficialaj, neniam akceptitaj per formala decido far la Akademio - pri kiuj oni pleje ne plendas. Ekzemploj estas lasero kaj perestrojko. Prove enkonduki novajn radikojn aŭ formojn estas ne ia aberacio, sed nemalhavebla parto de la mekanismo mem per kiu la lingvo evoluas kaj riĉiĝadas. Tiun metodon adoptis, abunde uzis kaj rekomendis jam Zamenhof.

El la novaj vortoj, iufoje sed ne ĉiam nomataj "neologismoj", sufiĉe multaj trovas imitantojn kaj tial fariĝas parto de la lingvo. Aliajn ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj ignoras, tiel ke ili forvelkas. Tiu uzo aŭ neuzo konsistigas la ĉefan kriterion. Oficialigo estas nur la fina, agnoska stadio de la procezo.

La Akademio kontrolas, konfirmas kaj ordigas.

Iafoje, sed ne ofte, ĝi admonas kaj en tre ekstermaj kazoj ĝi kondamnas. Nur escepte ĝi preskribas, ĉar ne tia estas ĝia funkcio ordinara. Unuvorte ĝi esplore kaj garde atentis la evoluon de la Internacia Lingvo, laŭ maniero ĝenerale tre tolera.

KRONIKO de la NUNTEMPO

FACIL-ANIME

Mi memoras, kiel en akademia kunsido dum la UK de Antverpeno (1983) Claude Piron koketis per sia nescio pri la moroj kaj kutimoj de la Akademio, anstataŭ ilin studi kaj familiariĝi kun ili. Nu, en publika letero de 1989-09-13 li sciigas pri sia okazinta "eksiĝo" el la Akademio, kiun de li "postulas nerva higieno". Kaj lamente li aldonas, "ke dekomence mi sentis min nehejme en tiu institucio". Oni demandas sin, en kia spirit-stato troviĝis Piron, kiam li decidis membriĝi? Al kiu li intencis plaĉi? Al si mem? Por atendi ĝis lia animo narcisa trovos ŝike denove iri?

Sed ja pli gravaj faktoroj lin movis! Por ekzemplo la rimorsoj sentutaj*, se li devus nomi difinitan landon Koreo, kvankam la interfrataj rilatoj (laŭ li) regantaj en Esperanto nin devigas (?) akcepti, kion volas la koreaj esperantistoj.

Kaj ili volas loĝi en Koreio (aŭ eble iuj konservativuloj en Koreujo)! Oni sin demandas, kial la Akademio ne faciligis al si la aferon, sendinte demandilon al la diversaj landaj asocioj (ekz. en Grenlando) por demokrate ekscii ilian sintenon, akorde kun la spirito de Esperanto (ajne, kion Piron kredas la spirito de Esperanto).

Ĉar ne tiel agis la "despoto" Albault, la honesta Piron "eksiĝis". Sed ni ekscias el lia "demisia" tirado ankaŭ, ke laŭ li "la rilatoj" (en esperanto) estas "interfrataj, ne de (pra)patroj al (pra)filoj".

Belaj vortoj de dimanĉa predikisto! En sia plej freŝ-data libro "LA BONA LINGVO" (Budapest 1989) Piron parolas alian lingvon. Plaĉis al lia orgojlo fari Prof. Waringhien la cel-tabulo de siaj atakoj kaj nigriĝoj... Jen kelkaj perloj de liaj "interfrataj rilatoj": Mi indignas, ke homo tiel malmulte internaci-mensa havis tiom da potenco pri nia lingvo, kiel prezidanto de la Akademio, kiel ĉefredaktoro de la precipe unulingva vortaro, kiel kunaŭtoro de la Plena Gramatiko... (p.80). "Obsede fantomas al mi la demando: ĉu Waringhien serioze enprofundiĝis en esperanton?" (p.81). Malfacilas eviti la konkludon, ke la kono de Esperanto ĉe Waringhien, estas elekstera kaj ke li havas antaŭjuĝojn kontraŭ ĝi... (p.81).

Oni sin demandas pri la motivoj de homo, kies profesio estas tiu de psikologo kaj psikoterapiisto aŭ, kiel li diras en la citita libro de "plifeliĉigisto" (p.12), kiam li tiel grobe atakas la nestoron de Esperantujo? Ĉu eble tamen ĵaluzo pri "tiom da potenco pri nia lingvo", potenco esprimiĝanta ne nur en la vortaroj kaj gramatikoj de Waringhien, sed ankaŭ en liaj tradukoj, liaj eseoj, liaj poemoj? Nenie tamen mi legis ĉe Waringhien vortojn similajn al tiuj de Piron. Se Pironon ne impresas la verkoj de Waringhien, almenaŭ ties homa staturo povus lin impresi! Sed certe eĉ tion ne emas lerni la demagogoj...

Reinhard HAUPENTHAL

N.de la R.:

° Efektive temas nek pri "eksiĝo" nek pri "demisio", sed simple pri nerekadatiĝo ĉe fino de elektoperiodo!

* "Sentutaj" = kiujn li estus sentinta.

|| Kaloĉaja vorto: malĝentilega (vd. NG, 2.eld., p.25).

Verdiktojn ĝi prezentas ne facilanime. Ofte ĝi montriĝas organo konservativa, tiom ke la senpacienuloj ĝi daŭre akuzas pri nenifarado. Pri multo ĝi diras nenion, ĉar tion ĝi ne rigardas necesa. La Akademianojn oni elektas pro bona kompreno pri la fenomeno lingvo ĝenerale, kaj pri Esperanto specife. Tiaj kvalitoj ideale igas la koncernatojn singardaj kaj maldogmemaj, kvankam ili ne montriĝas perfektaj, estante homoj.

Mi ĉiukaze ne dubas, ke iam far estos oficialigita, pro la jenaj kialoj:

1° La prepozicio de multsenca ne malofte prezentas problemojn de ambiguo, kiel PIV cetere ilustras en la cititaĵoj.

2° Far havas du tre bonajn kvalitojn: ĝi konsistas el unu silabo, kio dezirindas ĉe prepozicio altfrekvenca, kaj ĝi estas tuj komprenebla - ne postulante apartan lernon - ĉar ĝi nature evoluis el la lingva materialo de Esperanto.

Sed ĉu eblas, ke la Akademio povos iam oficialigi formon aŭ vorton antaŭe malakceptitan? Certe jes. Tre bona ekzemplo de tio estas la landnoma sufikso -io kiel en Anglio, Francio, kaj Germanio.

Pri tio ni legas en la PIV sub -i. "RIM.1 Kvankam por pluraj Eŭropaj landoj tiu suf. liveras nomojn pli internacie rekoneblajn ol uj, la Lingva Komitato dufoje rifuzis ĝin oficialigi kaj eĉ protestis kontraŭ ĝia uzado en tia okazo, kio ne malhelpis ĝian disvastiĝon".

Tiel statis la demando dum sufiĉe longa tempo, ankaŭ en 1970, kiam estis eldonita la PIV. Sed tio ne malhelpis, ke la Akademio de Esperanto (la aktuala nomo por nia Lingva Komitato) fine tamen akceptis landnomon -io kiel egalvalora al -ujo.

La afero estas tre instrua, diversrilate. Unue la antaŭa rifuzo estis eĉ dufoja. Due aldoniĝis protesto. Trie, kiam oni ĝin relevis, la temo elvokis multajn reagojn kontraŭajn el inter la Akademianoj mem, inkluzive artikolojn miajn - ĉar tiu uzo de -io interalie signifas, ke per ĝi Esperanto akiras elementon de nekonsekvenco, de nereguleco.

Oni ekzemple nun ne povas senpere scii, ĉu la ĝusta formo por indiki loĝanton de Anglio, estu Anglo aŭ Angliano, dum por Aŭstralio eblus teorie ne nur Aŭstraliano sed ankaŭ Aŭstralo. Nun jam ne sufiĉas lerni unu-du regulojn kaj apliki ilin, sed memori krome, ke al specifaj landnomoj kiel Aŭstralio, Kolombio, Zambio k.t.p. aldonendas -ano. Alivorte necesas parkerigi apartan liston, kiu devus speciale aperi en la lernolibroj.

Sed vane, eĉ barakte, kontraŭargumentis homoj kiel mi. La Akademio decidis per plimulto, kaj jen oficialiĝis tiu uzo de landnoma -io. Eblas argumenti, ke tio signifas ioman degeneron de nia lingvosistemo, almenaŭ tiupunkte. Sed la rezultojn de la evoluo, kronitajn per oficialigo far la Akademio, mi devas akcepti, kvankam mi persone plu uzados landnoman -ujo"n".

Kompare kun tio la afero far estas vere bagatela. Kontraste kun -io, ĝian oficialigon oni ĝis nun rifuzis nur unufoje. Kaj ne aldoniĝis, kiel tiukaze, Akademia protesto kontraŭ ĝia uzado. Krome far alportas neniam problemojn strukturajn, eĉ ne ŝarĝante la memoron per atentinda lernotasko.

Tial mi ne dubas, ke iam la Akademio ĝin tamen oficialigos, pro la simpla kialo ke fare de estas tro longa, plumpa anstataŭaĵo por prepozicio. La ĉefa bazo por tia decido ne estus nur la nura gusto, sed la efektiva evoluo de Esperanto. Alivorte, se sufiĉe da homoj uzados far - ne nur en la poezio sed ankaŭ proze - nia supera lingvoinstanco fine ĝin oficialigos, iam.

Kompreneble ekzistas unu grava faktoro kiu ĝis nun malhelpis, nome ke temas pri prepozicio altfrekvenca, konsistiganta parton de la lingvokerno mem. Ĉi tio montriĝas multe pli rezista al ŝanĝoj, kiel ajn dezirindaj. Kaj tiel kompreneble ĝi devas esti, por certigi la stabilecon.

Certe ekzistas eblaĵo, ke far ne disvastiĝos multe pli ol nun. Povas esti, ke oni ĝin daŭre uzos ĉefe nur en la literatura lingvo, ĉu aŭ ne ĝi fine sukcesos oficialiĝi. Fakte validus argumenti, ke tiukadre ne vere gravas la oficialigo, ĉar temas pri fenomeno aparta.

La beletristoj uzadas multajn formojn malsamajn al tiu de la funkcia prozo. Efektive ekzistas almenaŭ du ĉefaj variantoj de Esperanto, nome la vulgara aŭ demotika kaj la literatura, inter kiuj kuŝas sufiĉa distanco - kiel en aliaj lingvoj. Frapajn ekzemplojn siatempe prezentis la diferencoj eĉ enormaj inter la idomo ĉiutaga kaj la beletra uzaĵo de la Latina kaj la Helena. Artacele ĉi-lastata utiligis eĉ apartajn dialektojn por diversaj ĝenroj literaturaj!

Pri la menciitaj variantoj de Esperanto la Akademio havas sintenojn diferencajn, ĉar regas en la literatura lingvo aliaj principoj, kiujn pri-trakti postulus apartan eseon. Ĉi tie mi nur konstatas, ke multaj neoficialaĵoj sin ja firme kaj permanente establis en la arta uzado de Esperanto, sen aŭ kun aprobo Akademia. Fakte, ĝis nun la Akademio ne vere okupiĝis pri tiu fenomeno. Inter tiuj formoj troviĝas far.

Kompreneble la literatura lingvo ofte influas la vulgaran, la demotikan. De tio far estas bona ekzemplo. Kiomgrade ĝi fakte disvolviĝos plie, tion devos decidi la estonteco. Intertempe ĝi sin jam plene establis en la literatura lingvo, eĉ proza, pri kio povas ekzisti nenia dubo.

Do vane ĝin atakas s-ro Woolf, kiu per sia artikolo nur evidentigas ke pri tiu afero mankas al li la ĝustaj fono kaj kompreno.

Edwin de KOCK

N.d.l.R. -

Jam temis pri "FAR" en du numeroj de LA LETERO (ĉe Demandoj kaj Respondoj n° 5&7). Verfakte kio ĝenas la plivastiĝon de la uzado de "far", tio estas la konfuzebleco kun la substantiva formo de la verbo "fari" precipe en famaj Zamenhofaj esprimoj kiel "Unu, du, tri, kvar, kaj finita la "far", "Kaptita ĉe l'freŝa far' ", k.c. Krome la uzo eblas nurkiel suplemento kaj ne kiel aganta komplemento de pasiva verbo; kion kontraŭas la 6-a Regulo de la Fundamento, kiu formale indikas la prepozicion "de" kaj do tolerus nur "fare de".

KELKAJ OPINIOJ PRI LA "LETERO"

El Harrogate (Britio): "Kun granda plezuro mi tralegis "La Letero de l'Akademio" -n, kiun vi afable sendis al mi antaŭnelonge. Mi, sendube, sciigis la aliajn membrojn de nia grupo pri tio, poste. Kompreneble, ni ĉiuj apogas la idealojn de La Amikoj... (D.F.Coates).

El Potsdam (Usono): "Gratulon pro la ĵus ricevita kvara numero de La Letero de la Akademio, kiun mi trovis tute interesa... (Humphrey Tonkin)

El Berlin (G.D.R.-): "Dankon pro la Letero de l'Akademio de Esperanto, kiun vi afable sendas al mi. Mi legas ĝin kun intereso kaj profito. (D.Blanke).

5

.../...

El Buanes (Francio): " Mi ricevis la 5-ajn numerojn de "La Letero de l'-Akademio de Esperanto". Mi deziras diri al vi, ke la enhavo de La Letero multe interesas min, sed mi trovas la jarabonon tro multekosta... (G.Coulon). R.d.l.R. - Ankaŭ ni trovas tion, sed... tia estas la vivkosto, kaj pli-boniĝo dependas nur de la nombro de abonantoj: jen la situacio!

El Bejingo (Pekino) (Ĉinio): " Dankon, koran dankon pro via sendaĵo "La Letero de l' Akademio de Esperanto"! Mi ĉiam legas ĝin tuj post mia ricevo kaj neniam rigardas ĝin kiel mian propran. Post mia finlegado, mi ĉiam tuj donas ĝin al aliaj miaj kolegoj en nia Ligo, por ke ĉiuj povu ĝin ĝui. Jam, se estas necese, mi tradukis ion el ĝi, por publikigi ĝin en nia revuo "La Mondo". Jam dufoje tion mi faris. Ĉe la nuna okazo mi kore gratulas vin pro la sukcesoj en via laboro kaj deziras al vi ankoraŭ pli da atingoj en via estonta laboro! (Zhu Mingyi).

El Esperantoamikoj en kulturligo de GDR: " Mi konfirmas kun granda danko la ricevon de la Letero n°8. Por mi estas treege interesa la artikolo pri terminoj... (O.Stolberg).

(Demandoj kaj respondoj: daŭrigo kaj fino).

D.- Laŭ la tendenco anstataŭigi la literon ĥ (kaj ĝian sonon) pli ofte per k (hemio - kemio), malpli ofte per nova radiko (hino - ĉino, ĥoro - koruso), kiel vi konsilus pri la vorto eĥo? Ĉu eko, ricevante homonimecon kun la prefikso eko, kiam uzata substantive, aŭ ĉu ekoo, analoge kun egoo? (Jan Sosniecki, Danio).

R.- Ni tuj rememorigu, ke la L.K. de aŭgusto 1921 aprobis la laŭvolan anstataŭigon de h per k "en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas post la litero r". Kaj efektive la evoluo tendencas ĝeneraligi la eblecon. Jen bela ekzemplo de evoluo por kontentigi tiujn modernajn lingvistojn, kiuj predikas por plej libera evoluo de lingvo, eĉ se tio estigas problemojn, kiuj ne simpligas la lingvon! Ja kiel eviti homonimecon? Ĝis nun la vorto eĥo en estis anstataŭgita laŭ mia scio, kaj eble tio montras, ke foje la sono ĥ estas necesa. Ĉiokaze ne estas la celo de la Akademio devanci la evo luon: ĝi nur registras aŭ arbitracias en okazo de konflikto. Ĉiokaze, se necese, ekoo estus la plej bona! (J.T.)

D- Ĉu vi povas klarigi al mi la regulojn por tranĉi vortojn? Momente plej ofte la komputilo decidas kaj mi plene konfuziĝas. Jen sube ekzemploj el "Literatura Foiro" N°117, en "Eseo pri literaturo de finnlandaj Svedoj":

- 1° - inter la vortelementoj: tri-an, fi-kanto, ge-junuloj, kurioz-aĵo;
 - 2° - inter du silaboj: muzi-ka, tri-umfe, dividi-gas, be-lega;
 - 3° - ie ajn: ta-sko, fin-nlando, moderni-smo, ample-ksa, finnlin-gvaj.
- Kio estas akceptebla kaj ne? (Renée Triolle).

R- Ne ekzistas oficiala regulo pri la tranĉo de vortoj liniofine, iuj tranĉas ilin, kiam la nombro de l' spacoj estas atingita; aliaj pli zorgas, ke la tranĉo okazu kune kun silabolimo... Mia propra gvidideo estas, ke la vortotranĉo devas faciligi la legadon ĉe via korespondanto aŭ ĉe viaj legantoj. Pro tio mi ŝatas, ke la liniofina tranĉo koincidu kun silabolimo kĉaj mi plej ŝatas, kiam la parto post la liniofina tranĉo konsistas almenaŭ el la akcentita silabo (plus la fina silabo)... (A.A.)

Efektive "la vortotranĉo devas faciligi la legadon", tial aŭ fonologie oni tranĉu laŭ silabolimo; aŭ vortformiĝe oni tranĉu laŭ vortelementoj ĉar sen-tema ne same signifas kiel sent-ema; la distranĉo "ie ajn" estas la plej malbona pro la dubsencecoj, kiujn ĝi riskas estigi! (J.T.)

D.- Skribis kolego Bernard Golden: "Antaŭ nelonge la redaktoro de la oficiala organo de landa Esperanto-asocio turnis sin al mi por respondo de lingva demando. Kial li ne sendis tiun demandon al La Letero mi ne povas diveni. Jen kiel li prezentas la problemon: -Ĉar la Akademio antaŭ kelkaj monatoj ree verdiktis kontraŭ la tempismo, asertante, ke ankaŭ la aspektismo estas "logika" sistemo kaj ke redaktantoj de Esperanto-revuo obeu ĝin, iu el la Akademianoj devas esti kapabla kaj preta klarigi al mi koncize, sed ĝisfunde, la regulojn de aspektismo, por ke mi ĝuste apliku ilin. Mi havas tute precizan demandon: ĉu la koncernaj paragrafoj en PLENA ANALIZA GRAMATIKO estas konformaj al la instruoj de la Akademio, precipe rilate jenan punkton (Vd §118): Laŭ PAG la izola pasiva participo ne havas ĉiam la saman signifon kiel ĉe malsimplaj tempoj tiel, ke oni rajtas diri "Amita virino...", sed neniam oni rajtas diri "Ŝi estas amita de mi".

R.- Jes, la koncernaj paragrafoj en PLENA ANALIZA GRAMATIKO estas ja konformaj al la FUNDAMENTO DE ESPERANTO, kiun observas la Akademio. Verbo indikas tempon, kiu koncize prezentiĝas laŭ du vidpunktoj:

1 - la TEMPO KRONOLOGIA rilatas al iu tempopunkto: ĉu NUN (prezenco - as), ĉu ANTAŬE (preterito -is), ĉu POSTE (futuro: -os);

2 - la TEMPO DE LA AGO mem koncernas tiun de la plenumiĝo (ĉu anoncita, efektiviĝanta, aŭ finita).

Jam principe la simplaj tempoj povas enteni ambaŭ tempojn:

-la futuro implici agon nur antaŭviditan: Maria skribos leteron- ŝi intencos skribi leteron - ŝi estos skribonta leteron;

-la prezenco implici agon en plenumiĝo: Maria skribas leteron- ŝi estas nuntempe en skriba aktiveco - ŝi estas skribanta;

-la preterito implici agon plene finitan: Maria skribis leteron- ŝi finis la skribadon de la letero- ŝi estis skribinta.

Sed la kunmetitaj tempoj tre precizigas la ideon per tio, ke la tempon kronologian montras la helpverbo: La letero estos/estas/estis...

dum la participo montras la agmomenton:

PREDIKTAN: ... skribota... kaj Maria... skribonta (kun intenco aŭ decido skribi);

IMPERFEKTAN: ... skribata ... kaj Maria... skribanta (plenumanta la skribadon);

PERFEKTAN: ... skribita... kaj Maria... skribinta (fininta la skribadon).

Izole uzate, sen la helpa verbo, la participo memkompreneble indikas antaŭ ĉio la kronologian tempon, nur kuntekste la agmomenton: "Amita virino ne plu estas amata!" same kiel "Mono havata estas pli grava ol havita" - "Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota!" (FUNDAMENTO, §22).

J.T.

Precizigo.-

La kaptilo estas jena: en Andersenaj Fabeloj, volumo 4-a, p.111, Zamenhof skribis: "Nun ĝi (t.e. glaseto, kiu disrompiĝis) finis sian servadon kaj estis amita. Kun la filo de Anneto la afero estis alia! (li dronis). Tamen en la ĉiela regno neniu animo povos plu diri: "li neniam estis amita!"

Laŭ Mogens Groth la signifo de la dana teksto ŝajne estas: "Nun la glaseto finservis kaj ĝi ja jam estis amata (=ŝatata): tia neniam estis la filo de Anne Lisbeth! Tamen en la ĉiela regno neniu animo povos plu diri: "mi estis neniam amata!"". Andersen subkomprenis, ke mortinte ĉiu animo ricevas la amon de Dio, kaj do ne povas plendi pri "neniam amata". Sed mi ne komprenas kial Z. uzis "amita" en tiu peco; se ne estas legeraro (Z. skribis tamen siajn a tre klare diferencaj de i), eble li volis eviti tro pezan formon: "estis estinta amata", kaj tio estus ekzemplo de pluskvamperfekto? Tio kongruus kun la U.V., kie, sub -it, ni legas: ending of past part. pass. in verbs; e.g. AMIT' having been loved.

G.W.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D. Ĉu la uzado de verbaj formoj kiel devontus, devotus, fermintis, devigantas, devigatas... ktp estas ĝusta, ĉar konforma al la aglutineco de la lingvo?
(Marc Louste).

R.- Laŭ la FUNDAMENTO la pasivaj formoj de verbo rezultas el kombinado de la verbo "esti" kaj "participoj": "Ĝi estas amata de ĉiuj - La pordo estas fermita."

Jam de longe pro la pezeco de tiuj formoj estas provataj tiaj formoj, en kiuj la verbaj finaĵoj estas simple aldonataj al la participoj: "amatas" anstataŭ "estas amata". Sed, kiel skribitas en la Plena Analiza Gramatiko (p.137, "Tia kunmetado estis tiel konforma al la konstruo de la lingvo, ke ĝi estis plurfoje kaj plurorigine proponita. Tamen ĝi neniam prosperis en la komuna lingvo, pro la malfacilo de uzado kaj komprenado, kiun kaŭzas la ekzisto de triobla participa sufikso kaj la duobla signifo de ĉiu el tiuj sufiksoj, ĉar ili montras kune la pasivecon kaj la tempecon". Unuvorte la uzado estas ne malĝusta sed tro kompleksa por perfekta komprenebleco: ĝi plej ofte aperas nur en versfarado.

(J.T.)

D.- Kiel kaj kial ni alprenu la vortojn "ingredienco kaj precedenco" por "ingrediento kaj precedento", kiam ni povas tutbone uzadi la "fizikajn" vortradikojn ingredi/i/o kaj preced/i/o, same kiel ankaŭ dum la unua vivperiodo de tiu ĉi lingvo oni uzis "administraci/i/o" por la nuna administr/ad/i? Ankaŭ kial ni uzadu la vorton "diferenc/i/o" anstataŭ igebla per la simpla difer/i/o?

(D-ro Cimon G.Eliopoulos)

R.- Kiel atentigis D-ro A.Albault kaj rimarkigis Prof.G.Waringhien en P.A.G.(p.477), "Etimologie la finaĵo - ent montras al konkretaĵoj kaj la finaĵo - enc (el la latina -entia) al abstraktaĵoj: tendenco, diferenco, -pacienco ktp." Tiel kaj "tial la formojn "ingredienco" kaj "precedenco" Zamenhof tiris bedaŭrinde el la germana, dum la rusa proponis al li la ĝustajn kaj uzendajn: ingrediento kaj precedento".

La Akademio konstatas uzadon, sed ne estas ĝia celo devanci evoluon: Zamenhof mem enkondukis la vortojn kun -enc/i/o verŝajne pro pravaj motivoj, se ne li estus foriginta la sufikson ĉi-supre konsideratan kiel superfluan.

J.T.)

(daŭrigo p.7)

N.B.:

La respondoj estas opinioj de akademianoj responde al demandoj de legantoj; ne konfuzi kun rezolucioj kaj decidoj de la Akademio, kiuj ĉiuj rezultas el instituciaj voĉdonoj.

"La Letero de l'Akademio de Esperanto", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l'Akademio de esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio

Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX Redaktoro: Jean THIERRY Presejo: Coconnier, Sablé s/ Sarthe- C.P.P.P. n-ro 69710 1 n-ro: 40FRF Jara abono: 120FRF. Pagebla ĉe kontoj:

Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris

U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Nordo: S-ro Jan SOSNIECKI, Dalslandsgade 8, M201 DK-300 Kopenhago S. Danio- Poŝta ĝiro: 8 55 56 72

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEMA Yosimi, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, TOKYO 153-Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur. 3493; villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.